# La Hodiaŭa Ĵurnalo

2017-12-02 n-ro 373

# Orbita kosma ŝtato celas internacian rekonon



Venezuelo: Human Rights Watch kondamnas «ĝeneraligitajn perfortojn» kontraŭ la opozicio

Putin proponas programon pri antaŭenigo de naskindicon

Per sciencteknikaj rimedoj antikvaĵoj ligas la tradicion al la vivo de ordinaruloj

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin [Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus

Venezuelo: *Human Rights Watch* kondamnas «ĝeneraligitajn perfortojn» kontraŭ la opozicio
*Tiuj perfortoj inkluzivas «nekontesteblajn kazojn de torturo kaj plenan nepunitecon por la atakantoj» p. 03*

Per sciencteknikaj rimedoj antikvaĵoj ligas la tradicion al la vivo de ordinaruloj
*Muzeo de la Imperiestra Palaco de Pekino p. 04*

PUTIN proponas programon pri antaŭenigo de naskindicon
*146,8 milionoj da homoj vivas nuntempe en la lando, kontraŭ 148 milionoj en 1991, la lasta jaro de la epoko de Sovetunio p. 05*

Orbita kosma ŝtato celas internacian rekonon
*Spaco estas nun oficiale hejmo por la unua "spaca nacio" p. 06*

Hodiaŭe
*Humphrey TONKIN; Jaume GRAU CASAS; Venelin MITEV; kaj Francio p. 07*

# Venezuelo: *Human Rights Watch* kondamnas «ĝeneraligitajn perfortojn» kontraŭ la opozicio




«Ĝeneraligitaj perfortoj» kaj torturoj estas plenumataj en Venezuelo kontraŭ la opoziciuloj al Prezidento Nicolas MADURO, raportis merkrede [29 nov 2017] la organizaĵo *Human Rights Watch* aludante la plej altan potencan medion.

Tiuj perfortoj inkluzivas «nekontesteblajn kazojn de torturo kaj plenan nepunitecon por la atakantoj», substrekis José Miguel VIVANCO, direktoro pri Amerikoj de la usona NRO.

«Tute ne temas pri izolitaj perfortoj aŭ porakazaj ekscesoj plenumataj de friponaj policistoj, sed ja pri sistema praktiko de la venezuelaj sekurecaj fortoj», daŭrigis José Miguel VIVANCO, substrekante «registaran kulpon je la plej altaj niveloj».

La raporto nombras 88 kazojn, implikantajn almenaŭ 314 personojn, kaj konstatitajn inter aprilo kaj septembro 2017, kiam la ondo da kontraŭ-registaraj manifestacioj okazigis ĉirkaŭ 125 mortintojn.

«Membroj de sekurecaj fortoj violente frapis malliberulojn kaj torturis ilin per elektraj malŝargoj, asfiksioj, seksatencoj kaj aliaj perfortaj teknikoj», diras la raporto.

«La sekurecaj fortoj uzadis misproporcian perforton, plenumis perfortajn ekscesojn kontraŭ la loĝantoj sur la stratoj, arbitre arestis kaj persekutis opoziciulojn al la registaro», laŭ HRW.

Bazita sur interparoladoj kun viktimoj kaj ties proksimuloj, medicinaj raportoj kaj fotoj, la raporto estis kune ellaborita de HRW kaj la venezuela grupo pri defendo de la homaj rajtoj *Penal Forum.*

Riĉa je nafto, Venezuelo sinkas en profundan ekonomian kaj politikan krizon. Suferanta pri malabundo kaj hiperinflacio, ĝi estas, laŭ la agentejoj pri financa taksado *Standard & Poor's* kaj *Fitch Group*, en situacio de parta nepagipoveco.

La posteulo de Hugo CHAVEZ, Nicolas MADURO, elektita en 2013, anoncis merkrede [29 nov 2017], ke li kandidatiĝos por nova mandato en 2018. la prezidenta baloto estas antaŭvidita en decembro 2018, sed kelkaj spertuloj opinias, ke ĝi povus esti prokrastita ĝis marto 2019.

Neniam Milito Inter Ni

# Per sciencteknikaj rimedoj antikvaĵoj ligas la tradicion al la vivo de ordinaruloj

La sekcio pri ciferecaj teknikoj de la Muzeo de la Imperiestra Palaco de Pekino ĵus anoncis, ke ĝi atingis la finon de la plej nova "esplorado": t.e. oni finis la fotadon de sume 23 antikvaj bronzaĵoj per tridimensia fotilo. Dum la rigardado de tiuj fotoj oni povas per muso malfermi la kovrilon de la bronzaĵoj kaj rigardi la interne ĉizitajn epigrafojn.




"La tridimensiaj fotoj povas montri al la publiko tiujn detalaĵojn kiujn ordinaruloj ne povas vidi eĉ dum la eksponado de la bronzaĵoj. Ĉiu foto estas altprecize skanita kaj komputile modeligita, tiel ke la distingivo atingis 8K. Koncerna laboranto diris: "Tia klareco kontentigas eĉ postulojn por scienca esplorado. Tio ebligas, ke oni ne devu tiom ofte forporti la antikvaĵojn el la konservejo kaj remeti ilin tien, helpante eviti ilian eblan difektiĝon pro frapiĝo, tuŝiĝo, frotiĝo kaj tiel plu. La nova tekniko samtempe donas al pli multaj homoj la ŝancon rigardi la rarajn antikvaĵojn, kiuj estas longtempe konservataj en speciala loko".

"Laŭraporte ĉiuj antikvaĵoj kiuj estis tiel fotitaj estas bronzaĵoj, kaj estonte oni tiamaniere fotos ankaŭ porcelanaĵojn, vitraĵojn kaj aliajn. "Krom por esploro, tiaj fotoj povas esti kunpremitaj kiel materialoj por krei komputilajn ludojn aŭ interagajn programojn de scienc-popularigo. Pli multe da ordinaraj homoj povos 'ludi' rarajn antikvaĵojn per sia poŝtelefono."

Portante kaskon de virtuala realo, la vizitantoj povas vojaĝi trans la tempo al la sama palaco antaŭ centoj da jaroj. Ili ne nur povas ĝui diversajn pejzaĝojn de la tiutempa palaco, sed eĉ "paroli" kun konataj antikvuloj. La koncernaj laborantoj de la muzeo bezonis du jarojn por konstrui la virtualan rezidejon de imperiestroj kun centprocenta versimileco.

Estonte, la ĝardeno de la virtuala palaco estos ekipita per interagaj programoj, per kiuj eblos, ekzemple, nutri fiŝojn. Kaj la vojaĝaj informoj de la vizitantoj estos kolektitaj de la sistemo, tiel ke la muzeo povu provizi ĉiun vizitanton per anticipe mendita servo laŭ lia aŭ ŝia postulo. Oni diris: "La bezonoj de la publiko fariĝos cifereca subteno al la evoluigo de ciferecaj projektoj de la muzeo."

La sciencteknikaj rimedoj aldonitaj al la antikvaĵoj ne nur simple vivigas la lastajn, nek estas sekvado de la modo

de la nuna interreta epoko. Oni fakte celas, ke la antikvaĵoj tiel povu ricevi "pli bonan vivon".

En "la hospitalo por antikvaĵoj" de la Imperiestra Palaco laboras ĉirkaŭ 200 restaŭristoj, kaj tie estas ankaŭ uzataj la plej modernaj aparatoj por la antikvaĵoj en la tuta mondo. Ekzemple, nur por ekzameni la antikvaĵojn oni uzas maŝinon de komputila tomografio, mikroskopojn, material-analizajn aparatojn, sendetruan ekzamenilon kaj tiel plu. La restaŭristoj, kvankam ekipitaj per tiuj sciencteknikaj aparatoj, tamen mem plej atenteme faras ĉiujn laborojn.

Nun la muzeo kunlaboras kun la kompanio *Tencent*, la teamo de la komputila ludo "Ŝtata arkitekto (*Minecraft*)" kaj aliaj. Shan Jixiang, la estro de la muzeo, diris: "Sendistinge de formo, la fina produktaĵo de niaj esplorado kaj evoluigo ne nur devas strebi al la modo sed obei la normojn fiksitajn de nia muzeo, kaj fine kongrui kun la celo disvastigi la kremon de la ĉina tradicia kulturo al la mondo. Nia fina celo estas: per sciencteknikaj rimedoj kunligi la tradician kulturon al la vivo de ordinaruloj."

Xie Ruifeng
El Popola Ĉinio

# Putin proponas programon pri antaŭenigo de naskindicon

La ŝtatprezidanto de Ruslando, Vladimir Putin, proponis programon de stimulado denaskemo cele eviti, ke la rusa loĝantaro plu daŭru malkreski. Ĉi-jare, unuafoje post kvin jaroj la lando malkreskis je pli ol 100 mil homoj. Fakuloj atentigas, ke tio estas nur la komenco de nova situacio, kies tempodaŭro povos etendiĝi minimume ĝis la jaro 2025.




La naskindico malaltiĝis je pli ol 11%, kaj la lando spertas ian “demografian truon”, simile al tiu okazinta en la jardeko 1990-2000, kiam la nombro de naskiĝoj draste falis, pro malriĉeco, sensekureco kaj alta mortonombro de viroj.

Inter la proponataj agoj, la plej ambicia volas subvencii parton de la pagoj de rentumoj pri hipotekoj, al familioj kiuj nasku la duan aŭ trian infanon ekde la jaro 2018. Se la propono estos aprobita,, la profitontaj familioj pagos 6% anstataŭ pli ol 10% de la rentumoj.

Laŭ freŝaj informoj, 146,8 milionoj da homoj vivas nuntempe en la lando, kontraŭ 148 milionoj en 1991, la lasta jaro de la epoko de Sovetunio.

Paulo Cesar Pires
esperanto.blog

# Orbita kosma ŝtato celas internacian rekonon

Spaco estas nun oficiale hejmo por la unua "spaca nacio". La novkreita ŝtato Asgardio lanĉis sian unuan sputnikon *Asgardio-1* al la orbito la 12-n de novembro 2017. Havanta dimension de futbala pilko la sputniko dum du tagoj atingis la Internacian Spacan Stacion per komerca ŝipo de NASA. La sputniko "*Nanosat*" enhavas 5 terabajtojn da datenoj pri 18 000 el 114 000 civitanoj de Asgardio por demonstri kapablon de la nacio konservi datenojn sendepende de iu surtera ŝtato aŭ korporacio; ĝi ankaŭ enhavas naciajn simbolojn, inkluzive flagon de Asgardio, blazonon kaj ellaboratan konstitucion.



Nomita per la nomo de la skandinava mita ĉiela urbo, Asgardio estis fondita de la rusa sciencisto Doktoro Igor AŜURBEJLI en oktobro 2016. Ekde la fondo de la ŝtato homoj de diversaj nacioj aliĝis la projekton por iĝi Asgardanoj. "Mi vere volas havi eblon vidi, ke homoj kapablas havi pliajn eblojn por esprimi siajn opiniojn", diris Rajven SIN, la Asgardia artisto, loĝanta en Honkongo, laŭ informo de CNN. "En la socio, en kiu ni vivas nun - ĉio ŝajnas esti aŭ kapitalisma aŭ komunisma - tio naskas multajn konfliktojn. Kiel homo mi ŝatus esperi, ke ni havos aliajn vivmanierojn. Por pli bona vivo kaj pli multaj opcioj."

Post necesa preparo kaj ekipado en la Internacia Spaca Stacio, *Asgardio-1* ekflugos aparte laŭ sia propra orbito, kie ĝi restos dum de 5 ĝis 18 monatoj antaŭ forbruliĝo en atmosfero. Tamen tio estas nur komenco de la Asgardia historio. La spaca nacio planas peti oficialan rekonon de Unuiĝintaj Nacioj kiel sendependa nacio kaj la lasta kondiĉo, kiun Asgardio devas plenumi estas konstrui enorbitiĝintan loĝstacion, kie Asgardianoj povos loĝi. Ankaŭ la fondinto sinjoro AŜURBEJLI komprenas, ke malfacilaĵoj estas antaŭe. "Ni devas esti kiel kutima lando. Ĉiuj landoj havas problemojn kaj baldaŭ ni havos la samajn," li diris al CNN. "Sed ni havos elstaran trajton malsame de kutimaj landoj, ĉar ni ne estos surtere."

Kirill NOVIĈENKO
Interalie



## Humphrey Tonkin

**Humphrey Richard Tonkin [hamfri] (naskiĝis la 2-an de decembro 1939 en Truro) estas brita-usona esperantisto, eksa prezidanto de TEJO kaj UEA.**

**En Esperanto aperis pluraj publikaĵoj kaj tradukaĵoj.**

**Vikipedio**

## Jaume Grau Casas



**Jaume Grau Casas [ĵaŭme graŭ kazes] (naskiĝis en la 2-a de decembro 1896 en Barcelono kaj mortis en 1950 en Valencio) estis kataluna poeto en Esperanto. Li estas konsiderata la precipa [?elstara] Esperanto-poeto el Katalunio.**

**En Esperanto aperis: *Amaj Poemoj; Novaj Amaj Poemoj; La Lasta Poemo*.**

**Vikipedio**



## Venelin Mitev

**Venelin Mitev (n. 2-an de decembro 1942) estas bulgara poeto, tradukisto, ĵurnalisto kaj eldonisto.**

**En Esperanto aperis: *Tradukarto; Somero Cigana.***

**Vikipedio**



## Bildo de la tago

***Saint-Jean-de-Luz*, Francio**
**ĉe 1895.**

**Vikipedio**